

CIPIE... 1973



Kulturaj Kajeroj

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO
REVUE TRIMESTRIELLE DE CULTURE ET D'INFORMATION

Direktoro : P. BABIN, eks. prezidanto de la Kulturdomo de Franclingvaj Esperantistoj

J A R A B O N O

Jerabono : 80 fkoj

P. BABIN
Le Haut des Bourrelières
17, rue Romain-Rolland
85100 Le Château-d'Olonne
P.C.K. Nantes : 2.813.61 L


(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

1996 — 1


(JANUARO-FEBRUARO-MARTO)

EN TIU ĈI NUMERO

vi povos legi pri...



... aperitivo kun R. Schwartz



... Kaj prahistorio en Malto

KULTURAJ KAJEROJ

TRIMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

REDAKCIA KOMITATO:

Jeannine VINCENT
26bis, rue de Milngavie
F-49150 BAUGE

Pierre BABIN
17, rue Romain Rolland
F-85180 CHÂTEAU D'OLONNE

ENHAVO

paĝo

El Gresillon	1
Esperanto tra la Mondo (A. Frangeul)	2
Frandi tra la mondo (S. Boniol)	3-4
Londono antaŭ la "Kloak-trajno"	5-6
La malkovro de nia Mondo	7-8
Kvin urboj en la esperanta Beletro	9-10
Subkarpataj rakontoj (fino)	11
Amo sur la kvina etaĝo (Segalovič)	12-13
Por via Distro	14
La Vivo en Gresillon	15-16

EL GRESILLON

Granda sukceso. Peza laboro. Tia anonciĝas la Printempa Internacia renkonto de Infanoj. Aliĝis pli ol 90 personoj el kiuj pli ol 60 geknaboj. Peza laboro por la gvidantoj. Tiom da geknaboj el tre diversaj landoj interkonatiĝas dum tiu periodo dank'al, ne nur la sindonemo de grupeto da homoj, sed ankaŭ dank'al tiuj el vi, kies malavareco ebligis la, por kelkaj, longajn kaj kostajn vojaĝojn al Gresillon. Dankon al la donacintoj, dankon ankaŭ kompreneble al la donacintoj, ĉar la speciala Fonduso "Por la Infan-renkonto" daŭre funkcias.

NI FUNEBRAS

Denove, fine de la pasinta jaro kaj komence de 1996 la morto forfalĉis karajn amikojn.

Raymond PONS, jam de longe ne plu povis viziti la Kulturdomon sed, en Gresillon, neniu forgesis la afablan homon nek la

sindoneman esperantiston. Ĝis la malsano malebligis lian aktivecon, li gvidis kaj helpis esperantistojn en sia departemento "Ariège". Al lia edzino ni sendas nian amikan kondolecon.

Ankaŭ alia kara amiko forlasis nin. Felix MAURY mortis en februaro. Ankaŭ li de kelkaj jaroj ne plu venis al Gresillon pro malfacilaĵo alfronti la vojaĝon tra Francio. Sed li daŭre montris sian intereson por la Kulturdomo per financa helpo kaj ofta telefonado. Tiel li regule sekvis la vivon de Gresillon. Ĉiuj memoras la afablan, ĉiam ridetantan, amikon, kiu ne ofte parolis pri si mem kvankam li avintus multon por diri pri siaj suferoj dum la luktado kontraŭ la nazioj. Via personeco povus esti modelo, Felix. Al Marinette, kies neforgesebla edzo li estis, ni diras: "Akceptu fratecajn kisojn de viaj amikoj".

Jus atingis nin la informo, ke Paulette BASCOU diskrete malaperis. Kvankam ŝi iom post iom perdis la vidpovon ŝi daŭre ĉeestis esperantistajn aranĝojn kaj aktivis en sia urbo por Esperanto. Ankaŭ la ICEM-gekollegoj ne forgesos ŝin.

ESPERANTO TRA LA MONDO

EN UNIVERSITATOJ - Por la unua fojo, en la universitato de Valencio (Hispanio), en la fakultato pri Filologio, en aprilo komenciĝis oficiala esperanto-kurso por kiu la studentoj ricevos oficialajn poentojn kaj atestilojn.

En Italio okazis kursoj pri interlingvistiko, sine de la Universitato de Torino por 75 gestudentoj, kaj en la universitato de Romo III.

La universitato por Fremduloj en Sieno (Italio), kiu ankaŭ okupiĝas pri la lingvo-instruaj metodoj, decidis starigi kurson per korespondan de esperanto, ĉefe por instruistoj ĉiunivelaj, parte sekvive de la ministeria cirkulero lasttempa pri esperanto.

La atesto pri plenumo de la kurso validas por akiri poentojn por la instruista rango-listo.

La universitato de Romo III anoncis lastjare senpagan korespondan esperanto-kurson por 50 geinstruistoj, kiuj poste povos instrui la lingvon en eksperimentaj kursoj. Fakte, la aliĝpetoj nombriĝis pli ol tricent. Oni provas trovi vojon por kontentigi ĉiujn.

ĈE LA EŬROKRATOJ - Lasttempe, s-ino Edith Cresson, kiu okupas gravan postenon en la Eŭropa Komisiono, denove esprimis negativan opinion pri esperanto.

Kontraŭe, intervjuita de Istvan Ertl, redaktoro de "Esperanto", s-ino Emma Bonino, italino, membro de la Eŭropa Komisiono pri Homaj Rajtoj kaj Rajtoj de la Konsumantoj, sin deklaris amikino de esperanto kaj preta ankaŭ estonte pozitive agadi favore al esperanto.

Pro la venontaj lingvaj problemoj en la eŭropa "maŝino", pro la estontaj aliĝoj de pliaj landoj, pli kaj pli da eŭropaj parlamentanoj, de diversaj landoj, opinias, ke oni devos verŝajne serioze ekzameni la demandon pri neŭtrala lingvo.

EL ĈINIO - Krom la Internacia Akademika Konferenco pri Scienco kaj Tekniko en esperanto, kiu okazos en Pekino, de la 2-a ĝis la 7-a de septembro, oni anoncis Internacian Esperantan Soman Semajnon por gejunuloj kaj geknaboj kaj Simpozion pri kompilado de esperantaj lernolibroj kaj didaktiko, ankaŭ en Pekino, 15-21 de julio.

EL AFRIKO - De la 26-a de decembro ĝis la 3-a de januaro okazis en Moshi (Tanzanio).

la 4-a Esperanta Afrika Kongreso kun 38 partoprenantoj el Tanzanio, Zimbabvo kaj Burundio kaj el diversaj aliaj landoj.

EL GERMANIO - FAME-Fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj, en ligo kun la germana urbo Aalen kaj la ŝparkaso de tiu urbo, atribuis en 1995 sian prestiĝan premion (10 000 germanaj markoj) al la brazila eldonisto Gersi Alfredo Bays, kiu eldonas la literaturan revuon "Fonto". La fondaĵo decidis starigi, ek de 1997, sciencon premion de 3 000 germanaj markoj, kiu estos atribuita ĉiun duan jaron, por bezonata faktermino aŭ alia esperanta verko, laŭ diversaj kriterioj.

EL ĈEĤIO - La prezidento de la Ĉeĥa Respubliko, Vaclav Havel, akceptis fariĝi Alta Protektanto de la 81-a Universala Kongreso okazonta en Prago (20-27/07)

KIEN IRI ĈIJARE? - Someraj esperanto-kursoj en Usono, en la Ŝtata Universitato de San-Francisko (24/06 ĝis 12/07). Informas: Cathy Schulze, 410 Darrel Road, Hillsborough, CA 94010, USA. Ankaŭ en la Universitato de Hartford (07/13 de julio). Informas: Hilda Grossman, Director of Summer programs, 200 Bloomfield Avenue, West Hartford, CT 06117-1599, USA.

Internacia Junulara Kongreso, Güntersberge, Germanio (29/07 ĝis 05/08)
SAT-KONGRESO, en Sankt-Peterburg, (13/20 de julio).

Nacia Kongreso de UFE, en Villeurbanne (16/19 de majo).

51-a SAT-Amikara Kongreso, en Bondy, de la 6-a ĝis la 8-a de aprilo.

22-a Internacia Semajno, en Sète, de la 7-a ĝis la 14-a de septembro. Informas D-ro Vienne, 5bis, rue du Dr. Roux, 34000- Montpellier.

En Batipaume (Agde) okazos staĝo kun trinivelaj kursoj kaj ebleco provi ekzamenojn (12/16 de junio). Informas: Cercle Biterrois d'Esperanto, 9 rue Georges Picot, 34500 Béziers. Aliĝoj ĝis la fino de Aprilo.

Kultura kaj Turisma Renkontiĝo en Antverpeno (24/27 de majo)

FRANDI TRA LA MONDO

Ĉu frandemuloj mallaudindas? Ja ne, ĉar dolĉaĵoj kaj ĉiuspecaj bongustaĵoj ofte ligiĝas kun festo, familia aŭ amika kunveno, datreveno – sume kontribuas al interhomaj glataj rilatoj. Ni iom priesploru la temon tra kelkaj landoj kaj...sekvu nian nazon.

FRANCIO – En la nordaj kaj orientaj regionoj la baptopatroj dumlonge kutimis donaci al la baptotiloj pupformajn kukojn, kiel feliĉigilon por la novjaro.

Preskaŭ ĉie dum la granda fasto kaj en la palmodimanĉo, kornohavaj kukoj estis interŝanĝataj, kiuj laŭdire forigis la diablajn sorĉaĵojn. Krome kelkaj pastaĵoj alprenis bestoformojn: en Elzaco ŝafid-formaj kukoj simbolis la paskajn festojn, judan kaj kristanan. Notindas, ke kukoj en aparta rilato kun religiaj festoj, povas enteni ne seksekciajn, sed stimulaĵajn substancojn. Sur la kamparo ofte okazas, ke kristanaj kaj paganaj simboloj intermiksiĝas.

En la momento de karnavalo oni kutimis kuiri krespojn kaj fritpastaĵojn; la unuan oni devis forĵeti sur la kampojn, por ke la rikolto estu pli abunda; alian oni ĵetis sur la stalsterkon kun la kokinejo kuntuŝiganta, por ke la kokinoj pli facile ovdemetu. Tiujn dolĉaĵojn oni manĝis dum la antaŭkaresma mardo; se oni ilin frandus pli frue oni timus trafi bufojn en ili....

GERMANIO, CENTRA EŬROPO – Dum la antaŭfestaj semajnoj oni kuiras pipro-kaj cinamospicitajn kukojn. Ĉiuj mastrumistinoj kunigas en kuirejo, kantas kaj ektumigas kandelojn laŭ vera ritaro, dum ili laboradas. La kukoj estas gardataj en ladskatoloj kaj dismetataj sub la abion dum la festotago.

HUNGARIO – Depost la 13-a de decembro (festo de la lumo) la dommastrinoj ankaŭ kunigas por kuiri kukojn kun papavaj grajnoj kaj sekaj fruktoj. Kaj lerta dommastrino devas elturniĝi, por ke

restu sufiĉe da tiaj kukoj ĝis Pasko. Estas tre malfacile ilin prilabori, ĉar tri fojojn oni platigas plurmetran pastotavolon sur longa tablo kovrita per blanka tuko, plia ritaro.

Samlande notindas kortuŝa kutimo, t.e. la "manĝaĵo de amikeco". Kiu deziras amikiĝi, alianci, kunfratiĝi kun alia, tiu, pere de afabla sendito, proponu al la koncernato frandaĵon konsistantan el sep kukoj kun ovo (vivsimbolo) kaj brando-boteleto. Sur la donaco blankas ĉarme brodita tuketo. Se la donaco estas akceptata, iom poste oni reciprokas la afablaĵon. Tamen, se ĝi ne estas reciprokata, tio signifas, ke tiun amikecon aŭ kunfratiĝon oni rifuzas. La kundivido de la frandaĵo similas ian komuniĝon.

POLLANDO – Ĉu multaj scias, ke nia ŝatata babao (vortvorte: olda virino) estis diskonigata ĉe ni, en Francio, de la baptatro de la reĝo Ludoviko la XV-a? Origine ĝi konsistis el sekala faruno trasorbita de hungara vino.

RUSIO – Kio estas la tiel nomata "dolĉaĵo de Katarina"? (Temas pri Katarina la dua, kiu regadis en la momento, kiam ĉokolado estis enkondukata en Eŭropon.) Ĉokolado estis taksata magia, sekseksita substanco; tial la nesatigebla voluptemulino manĝis al siaj sennombraj amordonontoj la ĉi-sube priskribitan bongustaĵon. Por 12 personoj necesas: unu kilogramo da ĉokolado, deduo da ovo, sukero kaj cinamo. La miksaĵo fandiĝas en la buŝo kaj devas esti malvarmega, kiel glaciaĵo. Strangaj ideoj tiutempaj, ĉu ne?, pri ĉokolado, kiu dum la 18-a jarcento estis malpermesata en pluraj eŭropaj landoj fare de la tieaj policoj pro la supre-menciitaj propaĵoj en la "dolĉaĵo de Katarina" entenataj.

HISPANIO kaj KATALUNIO – Dum la Sankta Semajno oni uzis figojn kaj migdalojn, ilin kunpistadis en 15-centimetra muldilo. Maldikegajn tranĉaĵojn oni frandis, dum oni trinkis kafon kun cinamo. Oni opiniis, ke stimulaĵajn propaĵojn tiu manĝeto enhavas en la momento, kiam oni devas esti plej vigla por kanti kaj danci sur la stratoj. Ĉu tio estus la unua paŝo sur la mistika vojo?

VENEZUELO – La "dolĉaĵo el lakto" estas iaspeca laktokonfitaĵo, kiun viroj proponas, ĉu en restoracio, ĉu en la familia rondo, al la amatino. Ĝi venas al ĝi

sur ornamita telereto kaj konsistigas inviton al amo.

MEKSIKIO - La antikva kaj nuntempa meksikia kuirarto ofte uzas kapsikojn. Tamen dolĉaĵoj el ĉokolado kaj mielo jam delonge ekzistas. La Majaaj kultis al diaĵo de abelbredado. Ankaŭ plaĉis ĉokolado per kapsikoj spicita. Iam tre multekosta estis kakao pro la longeco de la irvojaĝo tien; tial la potencaj negocistoj emis inviti altfunkciulojn al pompaj bankedoj okaze de kiuj ĉokolado estis abunde proponata; originala farmaniero por samtempe elmontri sian riĉecon kaj dirloti timindajn gravulojn.

Nuntempe kukoj ofte estas pli bel-aspektaj, ol bongustaj. Ili estas foje gigantskalaj memorigaĵoj, ekzemple okaze de geedziĝo aŭ maĉo - eĉ ne mankas la verda grundo kaj miniaturaj ĉemizvestitaj sportuloj.

La unuan kaj duan de novembro disvolviĝas tipe landa folkloro, laŭ ni funebrostila, laŭ la tiea popolo ege ĝojiga. Sur la strato, preterpasanta infano petas la patrinon, ke ŝi aĉetu etan kranion por ĝi. Ĉar en kukvendejoj svarmas diverskoloraj kranietoj el sukero kun la nomo de la ricevonto skribita sur la frandaĵo. Cetere tiu azteka tradicio miksiĝas kun anglaj kaj usonaj kutimoj. Tiumomente la geknaboj iradas sur la stratoj sub sorĉistaj vestoj, bruas, almozpetas kaj elmontras citrolojn kranioformajn kun lumigitaj kandeletoj ene. Tio memorigas pri niaj mezepokaj mortodancoj...

Iam estis ĉarma, virtoplana virino, edzino de S-ro Frangipani, eltrovinto de la fama bongustaĵo samnoma. Ŝi estis disĉiplo de sankta Francisko el Asizo kaj, dum li malsanis en Romo, ŝi pretigis por li la supre-diritan bongustaĵon. Dum la tago antaŭ ol li mortis, li diktis leteron por ŝin averti, ke ŝi venu al li kaj kunportu ĉion necesan por la enterigo. Ĉar morton li antaŭsentis. Sed ĝuste kiam li estis la jenon diktanta: "Bonvolu kunporti ankaŭ tiun bongustaĵon, kiun vi manĝigis al mi, kiam mi malsanis en Romo", sonis ĉevalpasado. Jen alvenis la vidviniĝinta virino kun ĉio necesa por la enterigo, kiun ŝi antaŭsentis kaj...la frandaĵo...

S. BONIOL

TE-CEREMONIO


Dum la 16-a jarcento iu guberniestro de Kioto forlasis sian oficon kaj dediĉis la ceteron de sia vivo al la "Ŝa-no-ju", la tearton. Ĉu realo? Ĉu legendo? Certe tiu arto estas budismo-devena ĉar tiu trinkaĵo, "uzuŝa" estis regule uzata, kiel kuracilo pro siaj fortigaj kaj stimulaĵoj ejoj donitaj de teino, en la monaĥejoj jam en la 11-a jarcento. Ĝi havigis al la monaĥoj la spiritan kaj intelektan viklecon necesajn por meditado.

La te-arto fariĝis distraĵo kaj asketa ekzercaĵo dum la 14-a jarcento. Tepavilionoj estis konstruitaj en la restadejoj de princoj kaj de gravaj personoj. Ili estis fragilaspektaj konstruaĵoj el ligno aŭ bambuo. Tien oni iris laŭ vojeto slabita per malebenaj ŝtonoj diversdevenaj, nomita la "roji", kies celo estis elmedigi la vizitanton.

Antaŭ la pavilono staras benko ŝirmita de markezeto; tie sidatendas la invititoj la enirinviton. Dekstre estas baseno, kie oni lavas la diversajn ujojn.

La gastoj eniras tra malalta pordo: la kliniĝo de la kapo signas humilecon kaj egalecon. La ĉambro en kiu okazos la celebrado ne estas granda, ne pli ol 10 kvadratajn metrojn kaj nur ĝis 5 personoj ĉeestas. La aĵoj uzataj estas simplaj, krud-aspektaj; plie ili estas nesortimentitaj: braĝujo kun ligno-karbo, gisa bolilo (en kiu dancos kaj kantos fer-pecetoj por anonci la ekbolon), te-skatolo, ŝaŭmilo el bambuo, ĉerpilo el ligno, taso el grejso, fajenco aŭ parcelano; jen la ĉefaj aĵoj por Ŝa-no-ju.

Pri kio temas la konversacio? Pri la beleco de la iloj, pri historio aŭ filozofio, pri la pentrita rulaĵo, kiu dekoracias la alkovon kaj pri la bukedo, kiu staras iom dekstre aŭ maldekstre. Te-ceremonio instigas precizecon, belecon, indiferentigon. Aŭ koran nun ĝin lernas geknaboj en centoj da japanaj lernejoj.



LONDONO ANTAŬ LA KLOAK-TRAJNO

Meze de la 19-a jarcento, Londono estis la ĉefurbo de potenca Imperio regata de plej fama reĝino. Ĝi ankau estis la plej granda havenurbo en la mondo, dense loĝata, nodo de plej vasta fervoja reto. Pro tio la bordoj de Tamizo estis preskaŭ aermanke homplenaj. La Londonanoj devige flankenlasis la tradicion kaj konsentis, ke la veturproblemo en la urbo fariĝis maltrankvilige akra. Tiam, pli ol 750 000 homoj traveturis la urbon piede, rajde, veture; plie embarasis la vojojn ankau la veturiloj, kiuj portis fiŝojn al Billingsgate, legomojn kaj fruktojn al Covent Garden, viando al Smithfield, ĉar la nutraĵoj estis stokitaj ĉe la kvar anguloj de la ĉefurbo. Aldone alvenis karbo el Cardiff, ŝtalo kaj fergiso el Leeds aŭ Sheffield, lanoŝarĝoj el Manchester. Ĝis la 16-a jarcento la rivero Tamizo kaj kvar enfluantaj riveretoj utilis, kiel akvo-vojoj. Dum la elizabeta regno la vojoj de la reĝlando estis plibonigitaj kaj multigis kvar-ĉevalaj publikaj veturiloj nomitaj "coaches" pro tio, ke ili estis fabrikataj en la hungara urbo Kocs. Tiuj "koĉoj" ligis kelkajn grandajn urbojn kun...Londono.

En 1625 aperis du novaj veturiloj: la "sedan-chairs", port-seĝoj, kaj la "hackney coaches"; fiakroj por du personoj. Komence de la 19-a jarcento la "hackney-coaches" fariĝis "hansom-cabs", kies fiakristoj sidis supre, malantaŭe. La port-seĝoj estis uzataj ĝis 1825. La ordinara "coaches" iom post iom estis anstataŭitaj de "stage-coaches" aŭ diligencoj. Iuj estis "longaj" kaj veturis inter Londono kaj la grandaj urboj; aliaj estis "mallongaj" kaj rilatigis Londonon kun la ĉirkaŭaj urbetoj. Fine de la 18-a jarcento "mallongaj" diligencoj veturis inter la londona Civito kaj Paddington, tiam sendependa urbo, nur kvartalo de Londono. La veturo daŭris proksimume unu horon por vojirado 6-kilometra, ĉar dum longaj haltoj la kondukisto kelkfoje iris informi la vojaĝantojn en ilia domo. Okazis, ke vojaĝantoj rakontis ŝercojn aŭ muzikis per violono. Tiuj mallongaj diligencoj estis la unuaj veturiloj publikaj en Londono.

Nur la 4-an de julio 1829 aperis omnibusoj tirataj de tri ĉevaloj por dek vojaĝantoj; ili estis pli rapidaj kaj pli akurataj. Tridekfoje en la tago ili iris de Paddington al la Banko de Anglujo. En 1831 cirkulis la unuaj vapor-busoj inter Whitechapel kaj Stratford (Essex). Sed en 1840, profite al la naskiĝantaj fervojoj, estiĝis la "Turns pikes Acts", multekostaj impostoj pagotaj, (akcizo), kiam varoj eliris el la urbo aŭ eniris ĝin. Tamen la ĉeval-busoj daŭre veturis; sed en 1832, la "Stage Carriage Act" permesis al la kondukistoj enlasi aŭ ellasi la vojaĝantojn ie ajn survoje anstataŭ halti ĉe fiksay lokoj je precizaj horoj. Nur en 1858 fondiĝis en Londono la unua granda entrepreno de omnibusoj inda je la graveco de la angla ĉefurbo, fare de la Kompanio de la Parizaj Omnibusoj. Tiu entrepreno, la "Generala", aĉetis 600 el la 800 malgrandaj entreprenoj tiam ekzistantaj. Terura malordo regis koncerne la vojirojn kaj la prezojn. kiu multigis la vetur-malfacilaĵojn en la ĉefurbo. Ĝis 1933 la "Generala" kaj la subtera fervojo paralele funkcis kun multaj avataroj. En 1947 estis kreita nacia London Transport Executive, kiu kunordigis la londonajn transport-entreprenojn.

La plimultigo de la transport-rimedoj komplikiis la cirkuladon, ĉar la fervojoj veturis en urbon pli kaj pli loĝatan, neregulan transiran homaron orientigotan. Jam ekzistis sesono da finstacioj dissemitaj en la plej vivoplenaj kvartaloj. Bona solvo estintus interligi diversajn finstaciojn. Iu d-ro Cummings imagis solvon per vagonaroj veturantaj sur kolosa vitro-planko, super la periferiaj stratoj de Londono. Tie vagonaro ĉirkaŭirintus, kiel karuselo, por veturigi la vojaĝantojn de unu stacio al alia. La nomo de tiu sistemo estintus "Kristala Vojo". Tiu projekto ne estis subtenata de la loĝantaro. En 1861, usona inĝeniero, kies familia nomo estis promesplena, Francisko Train (trajno), provis instali sistemon de ĉevaltramoj kun 20 sidantaj kaj 12 starantaj vojaĝantoj. Sed la reloj, kiuj iom superis la ŝose-nivelon, okazigis akcidentojn kaj la afero fiaskis.

La genia sistemo de fervojo cirkulanta sub la stratoj kaj domoj de Londono ne estis elpensita de inĝeniero sed de simpla proceduristo, George Pearson. La Londonanoj jam kutimis iri sub Tamizo tra la

fama tunelo de Wapping, kvankam kelkaj obstinaj Londonanoj preferis uzi la pontojn kaj admiri "sian" havenon. Tamen, iom post iom, tiu "frena plano" ŝajnis esti la sola rimedo por malkongesti la centron de la metropolo. La projekto konsistis el liga vagonaro inter la finstacioj, kiu evitis la traŭladon de la urbo aŭ la eltraŭniĝadon ĉe la interaj stacioj. Tial naskiĝis la "Circle Line" (Rondira Linio) kun samcentraj ĉirkaŭiroj.

La projekto de Pearson estis modesta, nur 5,500 km. longa. La iniciatanto antaŭvidis transporton ne nur de homoj sed ankaŭ de varoj de iu stacio al alia utiligante la kalibron de la fervojoj. Pri financoj, Pearson devis interesi la Honorindan Korporacion de la Civito de Londono koncerne la transporton de homoj, kaj la potencajn Fervojajn Kompaniojn koncerne la transporton de varoj. Dum la klopodoj de Pearson la reagoj en la urbo estis diversaj. En la aristokrataj kaj konservativaj kluboj oni diris, ke Pearson estas danĝera anarkiisto, kiu celas la ruinigon de respektindaj konstruaĵoj, kiel Westminster Abbey kaj katedralo Sankta Paŭlo. Simplaj dommastrinoj timis, ke iliaj hejmoj renversiĝos pro la trepidado de la vagonaroj, kaj ke ili troviĝos rajdantaj lokomotivoj je te-horo.

Ĉar elektro ankoraŭ ne estis uzata industriskale, la vagonaroj povis esti nur vapor-movataj. Grava punkto! Ĉar, ĉu la vojaĝantoj ne riskos sufokiĝon pro la fumo ne forblovita eksteren? Plie, la tradiciaj britaj vojaĝantoj ne tiom timis la minacon por la vivo, kiom la malsupreniroj en la kloakojn; la projektita subtera trajno estis nomita de kelkaj "Kloak-Trajno". En Hyde-Park, kie s-ro luajn rajtas fari iu ajn deklaron, publike, al siaj samurbanoj, oni aŭdis multajn kritikojn. Dr. Cummings, projektinto de la "Kristala Vojo" diris eĉ, ke la konstruado de la subtera trajno anoncos la finon de la mondo. "Oni ne konstruu la vojojn al Infero!".

Finfine, en 1853, la Brita Parlamento voĉdonis favore al la fondado de la "North Metropolitan Company" per privataj kapitaloj kaj subvencio de 450 000 pundoj "elsirita" el la Korporacio kaj el la Fervojaj Kompanioj.

(el diversaj dokumentoj)

POEMOJ

KELKAJ KONSILLOJ AL LERNANTO

Ĉiam ĉe komenco
nepras pacienco.

Kiu notas abunde,
tiu lernas profunde.

Sen iom da labor'
lernado sen valor'.

Malpli gravas semo
ol la kultivemo.

Por meriti aŭreolon
fidu vian propran volon.

Homa estas la eraro
zorgu pri nur ne refaro.

Pensu pri l'akuzativ'
uzu ĝin, ne senmotiv'.

Trejniĝado, jen kuracil'
receptenda al krokodil'.

Foje, saĝa pacienco
faras eĉ pli ol scienco.

ORTODOKSAJ PARADOKSOJ

Birdeto sen plum'	Infekta imun'
ĉe obskura lum'	gratulo per pun'
nudiga kostum'	per ĝen'...oportun'
kaj senfajra fum'	Pasko en aŭtun'
sekiga akvum'	eĉ tago kun lun'
detala resum'	kaj nokto kun sun'

Malglata polur'	Tirado per puŝ'
laŭtega murmur'	sukceso per fuŝ'
harplena tonsur'	starado dum kuŝ'
malĝoja plezur'	...virino sen buŝ'.

Marcelo

LA MALKOVRO DE NIA MONDO

La kono de la ĉielo estas tute spekulativa, ĉar nur fine de nia 20-a jarcento oni trovis aplikojn, kiuj eble estos profitigaj por la estonta scienco. Male, la kono de nia planedo estas tuj utiligebla. Ĝi utilas por vojaĝoj, navigado, komeco, konkeroj. Pro tio la komercistaj kaj navigistaj popoloj, ĉefe mediteraneaj, ĉiam grave atentis pri ĝi.

Tiu konstanta deziro pri malkovro manifestiĝis jam dum la Antikvaj Tempoj per "periploj", tio estas ŝipiradoj ĉirkaŭ konataj kontinentoj. Sepcent jarojn antaŭ nia erao faraono Neĉao sendis siajn fenicajn maristojn malkovri la Ruĝan Maron kaj la legendan landon Ponto, kiu produktis incenson. La instrukcio donita al ili estis laŭiri la landbordon, kiel eble plej malproksime. Ĉar ili estis aŭdacaj ŝipistoj kaj konsciencaj funkciuloj, ili obeis la ordonojn kaj post tri jaroj ili trovis sin en

Mediterraneo, nesciante, ke ili nur ĉirkaŭiris Afrikon. Tiu grandfaro estas konata, kiel "la periplo de Neĉao", kvankam la faraono, dum la trijara vojaĝo, ne eliris el sia palaco.

Post cent jaroj Kartago komencas esplori la nekonatajn landbordojn, kiuj etendiĝas trans la Kolonoj de Herkulo (Gibraltaro). La ekspedicio de Hannon laŭiras Afrikon ĝis la rivero Senegalo, dum tiu de Himilĉon iras norden ĝis Bretonio. Unu jarcenton poste la marsejano Piteas malkovras la Britajn Insulojn; li mem nomis ilin tiaj; li malkovris ankaŭ Skotlandon kaj la Baltan Maron; li rakontis al siaj samurbanoj, ke ekzistas lando, kie, oni diris al li, la tago daŭras ses monatojn.

La ekspedicioj de Aleksandro iras orienten. La konkeranto surtere vojaĝas ĝis Induso dum lia ŝiparo atingas la saman landon post ĉirkaŭiro de Arabio. Ne tre famaj vojaĝantoj iras ankoraŭ pli malproksimen, trairas Hindion ĝis Hindoĉinio. Dum la Romia Imperio la konata mondo etendiĝas de la Ŝetland-insuloj ĝis Hanojo; ĝi ampleksas Eŭropon, Nord-Afrikon, Sudanion, Arabion, Kaŭkazon, Persion, Hindion kaj Sudan Ĉinion.

Kvankam ili inventis la kompason, la Araboj ne estis avidaj esploristoj. Sed la Okcidentanoj retrovis la tradicion de la Antikvaj Tempoj. Dum la 9-a kaj la 10-a jarcentoj la Vikingoj malkovras Islandon kaj Groenlandon. En la jaro 1000-a Leif, filo de Ruĝa Erik, probable atingis la nunan Amerikon. Koncerne Azion, ĉirkaŭ la 1250-30 jaro, ambasadoroj iris proponi al la Granda Hano de Mongolio la aliancon de la Papo kaj de la reĝo Ludoviko la 9-a, kontraŭ la Mahometanoj. Kiom mirigita estis la Granda Hano en sia malriĉega ĉefurbo Karakorumo, kiam estis malfacilege tradukita por li la strangaj proponoj de nekonataj, malproksimege vivantaj suverenoj! Kelkajn jardekojn poste la patro kaj la onklo de Marko Polo malfermis komercan vojon al Ĉinio kaj malkovris Pekinon post kvinjara vojaĝo. Dum la Mezepoko, la konata mondo etendiĝas de Ĉinio ĝis la marbordo de Ameriko.

Por ke sociale utili la akiritaj konoj ili devas esti transdonataj sur papiruso aŭ papero: la mondo devas esti rigardata homskale. Tial naskiĝas nova scienco: geografio kaj ĝia korolaro kartografio aŭ map-arto. Ni scias nur, ke en la jaro 580 a.K. la filozofo Anaksimandro, iris peti helpon de la Lacedemonanoj, pensi, ke li estos pli facile komprenata montrante al ili plateton el bronzo, sur kiu estis gravurita la lokiĝo de diversaj urboj de Mezzazio; tiu plateto estis la unua geografia mapo. Eble iu demandis, kiel tiom da homoj povis vivi sur tiel malgranda spaco!

En Grekio vivis pluraj "vojaĝ-rakontistoj", kiel Herodoto, kiu vizitis tiom da landoj. Sed ili estis esploristoj, ne geografoj. La verkisto Saint-Exupery, en "La Eta Princo" skribis: "La geografo estas tro grava persono; li ne gapvagas. Li sidas en sia skribejo. Tie li akceptas la esploristojn; li pridemandas ilin kaj prinotas iliajn memorojn". Tia estis Ptolemeo, kiu dum 14 jarcentoj ĝuis senrajtan famecon pro invento de kosmografia sistemo tute erara. Li probable neniam forlasis sian skribotablon en Aleksandrio, sed li verkis la plej tiuepoke grandan libron pri geografio, libro, kiu daŭre estos prestiĝa ĝis la Renesanco.

Tiam, dum la Romia Imperio, ankaŭ multiĝis la "picta", pentritaj mapoj

kompareblaj, kvankam malpli precizaj, kun niaj modernaj mapoj. Venis ĝis nia epoko la "Tabelo de Peutinger", kopio de romia mapo de la 3-a jarcento, kiu prezentas la mondon de Portugalio ĝis Hindio; ĝi estas vojplano ĉar ĝi preteratentas skalon, latitudon kaj longitudon.

Fakte ne eblas verki pri geografio sen geodezio, t.e. ne konante la mezuron de la Tero. Jam en 245 a.K. Eratosteno, ĉefkuratoro de la biblioteko de Aleksandrio, mezuris la Teron, relative ĝuste. Jen la procedo: je la somera solstico la suno situas ĉe la zenito de la urbo Asuano, tiam nomata Sieno, en suda Egiptio, ĉar je tagmezo la sunradioj iras, tie, ĝis la fundo de la plej profundaj putoj; notinte tiun fenomenon Eratosteno mezuris, je la sama momento, la angulon de la pozicio de la suno vidata de Aleksandrio. Li konstatis, ke ĝi egalas unu kvindekonon de cirklo, t.e. $7^{\circ}12'$. Ĉar Sieno troviĝas precize sude de Aleksandrio, li konkludis, ke la arko de tera surfaco inter la du urboj egalas unu kvindekonon de la cirkonferenco de la

Tero. Li multiplikis la distancon de Sieno al Aleksandrio per kvindek kaj trovis la rezulton 252 000 egiptajn stadiojn, t.e. 39 700 kilometroj. Rimarkinda rezulto ĉar la vera distanco estas 40 076 kilometroj ĉe la ekvatoro.

Sed pri la kalkulo de la longitudo oni devis atendi la 18-an jarcenton: Fakte post la trovo farita de Eratosteno, Hiparko mezuris la diferencon de horo inter la momento, kiam oni vidas luneklipson en du diversaj lokoj ĉe la sama latitudo. Sed liaj mezuroj estis malĝustaj, ĉar por kalkuli la horon Hiparko posedis nur simplan klepsidron ege malprecizan. Oni devis atendi la inventon de preciza horloĝo, t.e. la 18-an jarcenton.

El "Les bâtisseurs du Monde"

"La konstruintoj de la Mondo"

PTOLEMEO KAJ ASTROLOGIO

(Theoriae Novae)



KVIN URBOJ EN LA ESPERANTA BELETRO

Tiu ĉi kvizo temas pri kvin urboj priskribitaj en originalaj romanoj en esperanto: Ĉu vi povas diveni la nomojn de la urboj, kie okazas la eventoj? Kiuj estas la ĉefrolantoj, kiuj vizitas tiujn urbojn? Inter la aŭtoroj de la verkoj estas po unu franco (du romanoj), hungaro, polo kaj ruso. Du urboj situas en la sama lando, unu urbo estas antikva metropolo, alia troviĝas sur fikcia insulo kaj la kvina ĝis antaŭ nelonge estis dividita inter du malsamaj ŝtatoj.

A- "Nia aŭtomobilo skusaltetas tra la stratoj. Malrapide ni devas veturi. La stratoj estas tro malvastaj, la vojoj tro aĉaj kaj la pavimo tro malglata..."

"Nu", mi konsolas, "ni poste alveturos sur la "Via Appia" aŭ sur la Legionan Strategon. Tie ni povos rapidegi..."

"Tondre!" mi ekcitiĝas. Ŝi volas nun viziti nepre la koloseon kaj turmentas Karolo-n, ke li nepre veturu laŭ la plano! Mi vane provis konviki ŝin, ke tiu koloseo ankoraŭ ne estas konstruita...

Post duona horo, dum kiu ni vane serĉis la koloseon, ŝi insistis, ke ni vizitu la varmfontojn de Caracalla kaj poste la triumfan arkegon de Titus kaj Konstantinus. Poste, eventuale, ni povos halti ĉe la tombo de Hadrianus, kaj se sufiĉus la tempo viziti ankoraŭ la vaticanon..."

B- "La grandaj bulvaroj, kiuj de la preĝejo Madeleine ĝis la placo de la Respubliko vibras konstante sub martelanta pulso de febra vivego, prezentas pli da distraĵoj ol internacia kermeso. La magazenoj, kun siaj bonguste prezentitaj artikloj de..., la kolora movado sur la terasoj de kafejoj, la diverseco de l'promenantoj, eĉ la stratvendistoj kun siaj ruzaĵoj, kaj la policistoj, kiuj sindone klopodas, plej ofte vane, por endigigi la trafikon, ĉio havas apartan ĉarmon al paca gapanto."

C- ".....estas tute alia. Ĝi estas pli luma. Kaj pli simpla. komenciĝas je simpatiaj dometoj, kvazaŭ faritaj el ludkartoj. Kiam mi estis alvenanta, ili flugis, kvazaŭ pelataj de l'vento preter spegultviroj de nia rapida vagonaro. Ĉiuj ili identas, dronante en verdaĵo de legomĝardenoj,

ĝardenetoj kaj florejoj. Sed jen komenciĝas ŝtonaj konstruaĵoj, rezervaj relvojoj, fabrik-tuboj. La vagonaro surflugas viadukton, disjetante tondron en asfaltajn stratojn.... Nigra asfalto, en kiu mi vidas mian respegulon. Senfina ĉeno de aŭtoj. Senfina torento da homoj. Mirindaj duetaĝaj aŭto-busoj...."

Ĉ- "Ni pluvojaĝis. Post kelkaj minutoj ni troviĝis sen ia enkonduko en la urbo. Sekvis unu- kaj duetaĝaj domoj, ĉiu laŭ la sama stilo, kiel tiuj sur la kampoj. Komence mi miradis, sed poste la granda unuformeco vekis en mi manksenton.... Sed ni renkontis des pli multajn aŭtojn kaj elektrajn tramvagonojn. Tiuj kuradis preskaŭ senbrue kaj kun tia rapideco, ke mi miris, kiel ni povis eviti karambolon. Ĉe la stratanguloj ni trakuris super- kaj subvojojn krome, jen sub ni galopis elektraj rapidvagonaroj kun terura rapideco kaj preskaŭ tomsilente. Baldaŭ mi konstatis, ke la radoj de la vagonaro ne estas el fero, sed el ia stranga, senbrua materialo."

D- "Tuj lin frapis la du ĉefaj karakterizoj de Lumo kaj Bruo. Luma estas pri sia situo ĉe marbordo etendiĝanta senbare ĝis malproksimaj horizontoj, sub ĉielo ĉiam serena, kie energiaj ventoj, seniacaj purigistoj de l'atmosfero, forbalaas ĉiun nubojn jam dum ĝia formiĝo. Brua ĝi estas, ĉar ĝi estas havenurbo en afabia sudo. Surteriĝantaj maristoj bezonas, per ĝojaj krioj, kompensi la silenton de longa vivado surŝipa. Senhalta trafiko densiĝas ĉirkaŭ la havenoj: al-kaj-reveturado de kaleŝoj, ŝarĝportiloj, tramveturiloj, ne estas ebla sen bruo. La surĉara komerco de l'strato, la fiŝistoj, la kafej-terasoj, voko kaj kontraŭvoko en ĉiuj lingvoj, kaj la internacia imperativo de l'policista fajfilo, ĉio ĉi plisonorigas la fonon."

RESPONDOJ-

A- Fraŭlino Snob, kune kun Maria Fromaĝi sinjoro Kovalò kaj Karolo, la aŭtomobilisto, veturas tra la urbo Romo de la periodo de Nerono, serĉante vidindaĵojn priskribitajn en Baedeker-a gvidlibro de la 20-a jarcento. La pola verkisto Jan filmisto Jean Forge (pseŭdonimo de Jan Fethke) estas la aŭtoro de la sciencfikcia romano Saltego trans Jarmiloj".

NI RIDU

B- La misaventuroj sur la stratoj de Parizo de Anni Laufer, erarinta germanino, estas rakontitaj de Raymond Schwartz, franca humoristo, poeto kaj prozisto, en la romano "Anni kaj Montmartre".

C- Vitalij, rusa inĝeniero okupiĝanta pri la konstruo de metroo en Moskvo, iras al Berlino por studi ties metroon. La citita priskribo de la germana ĉefurbo venas el la romano "Metropoliteno" verkita de la rusa esperantisto V. Varankin.

Ĉ- La brita maroficiro Gulivero savas sin post ŝippereo, alboridiĝante en Kazohinio. De la marbordo de tiu imagita insulo, du Hinoj veturigas lin en aŭtomobilo al la ĉefurbo. La aŭtoro de la soci-kritika romano "Vojaĝo al Kazohinio" estas la hungara inĝeniero Sándor Szathmári.

D- Pierre Bouchardelle (kaŝnomo de Pierre Touchard), dum la dua mondmilito, iras al la sudfranca urbo Marsejlo (Marseille), kie li partoprenas en subgrunda patriota agado. Li rolas en la romano "Kiel Akvo de l'Rivero" de Raymond Schwartz.

Bernard GOLDEN



**NE AGU KIEL TIU SINJORO
PAGU VIAN ABONON
ABONIGU AMIKON EL NEPAGIPOVA LANDO**

Suferante pro sordormeco Roberto vizitis sian kuraciston, kiu preskribis potencon dormigan drogon. Dimanĉon vespere Roberto englutis siajn pilolojn, senprobleme dormis kaj eĉ vekigis antaŭ la alvoko de la horloĝo. Li trankvile iris al la laborejo. "Mi tre facile ellitiĝis ĉi matene", li diris al sia estro. "Mi ege ĝojas," ekkriis la estro. "Sed ĉu vi povas diri al mi, kie vi estis lundon kaj mardon?"

Aŭtomobilisto plenigas sian benzin-ujon. La pumpisto miras, ĉar li vidas du pŝngvenojn sidantajn ĉe la malantaŭo. "Kion vi faras kun tiuj du bestoj?" li demandas. "Mi gajnis ilin hieraŭ ĉe loterio. Mi ne scias kion fari." - "Provu la zoologian ĝardenon", sugestis la pumpisto. La postan tagon la aŭtomobilisto revenis. Daŭre sidis malantaŭe la du pŝngvenoj; sed ili surhavis sun-okulvitrojn. "Vi ne vizitis la zoo?", demandis la benzin-vendisto. "Nu, jes, kaj tio multe plaĉis al ili", respondis la aŭtomobilisto. "Hodiaŭ ni iras al la marbordo."

"Kelnero!" vokas kliento; "ekstere mi legis, ke via kafo estas speciala ĉar vi mem miksas diversajn kvalitojn. Vi mensogas!" - "Tute ne sinjoro", respondis la kelnero. Vi trinkis miksaĵon de hieraŭa kaj hodiaŭa kafo."

"Frederiko prenas sian malplenan teleron kaj iras al la bufedo en la restoracio la kvaran fojon. "Ĉu vi ne hontas tiom ofte viziti la bufedon?" diras lia edzino. "Tute ne", respondis Frederiko, "mi diras, ke mi plenigas vian teleron".

S-ro lu ĉeestas koncerton por plezurigi sian edzinon. Post duon-horo, lia edzino kubutpuŝas lin kaj flustras: "Honte! Aŭskultu! La persono antaŭ ni ronkas!" - "Kaj nur pro tio vi vekis min?"

Juna paro eniras kinejon kun bebo enbrake. "Se la bebo ploras vi estos devigata foriri" diras la akompanistino; sed ni repagos viajn biletojn". Post duon-horo la edzo flustras al sia edzino: "Kion vi opinias, Tiu filmo estas aĉa. Veku la bebon."

SUBKARPATAJ

RAKONTOJ

(fino)

"Jes, tia popolo vivas ĉi tie. Ekstreme fidema kaj malklerega," diris la unua ĝendarmo. "Mi povas tion ankaŭ certigi. Aŭskultu nur mian historieton okazintan antaŭ unu semajno.

"Vi certe aŭdis pri la murdo de Eliaŝ Hakulin. Do, mi estis komisiita kun mia kamarado, esplori la aferon. Ni alvenis al la vidvino de la murdita Hakulin, vespere, por gardi la kadavron dum la tuta nokto. Ni surgrimpis la fornon kaj, por nin endormigi, ni interbabilis. La vidvino de Hakulin estis kun ni en la granda ĉambro. "Sed tiu homo, kiu murdis Hakulinon estas nun ŝarĝita de granda peko," komencis kamarado Novak. "Tiu estos certe post sia morto turmentata en la infero." - "Certe, mi ne volus esti en la haŭto", mi rediris, divenante la planon de Novak.

Kaj ni nun komencis priskribi la turmentojn, kiuj atendas la murdinton-de Hakulin. Ni elpensis ĉiun eblan plej teruran turmentafon. Duonhoron daŭris nia interparolado, ĝis, fine, la vidvino ne plu povis elteni kaj ekkriis: "Ho, silentu, mi murdis lin! Dio estu kompatema al mia animo!"

"Mi rakontos al vi ion pli gajan," diris la tria ĝendarmo, "kvankam ankaŭ el mia servo. En la vilaĝo, kie mi nun vivas en ĝendarmejo, vivas maljunulo Pantaleon. Li estas mizerulo, sed antaŭ duonjaro li konstruis al si barakon el argilaj brikoj. Li estis tre fiero pri sia barako kaj, sidante en la gastejo de l'judo, li diris: "Barakon mi havas. Nun mi bezonas nur virinon." Li efektive elserĉis unu, kvindekjarulinon, Marja, kiu havis nenian hejmon kaj vivis el homa kompatemo; sed tamen ŝi estis forta kaj kuraĝa virino, kiu longe ankoraŭ ne opiniis sian vivon plenvivita. Do la maljuna sesdekvinjara Pantaleon venis al Marja kun sia peto. Marja pripensadis kaj fine konsentis. Sed la grizhara kaj kurbeta Pantaleon devis aĉeti liton kaj kusenon, kaj konstrui ankaŭ fornon: tiujn aĵojn li, ĝis nun, ne havis en sia barako. Poste li devis subskribi al Marja paperon, de Marja propramane skribitan, ĉar sciis, ke Marja lernis skribi kaj legi, kiel vi scias. Pantaleon ne scipovis tiun arton; li lernis nur

subskribi sian nomon per grandaj zigzagaj literoj. "Pantaleon, por ke vi sciu, kio estas sur la papero, mi legos tion, kion vi subskribos, male vi poste dirus, ke vi nekonscie subskribis: Mi, Pantaleon Karbovanec, propravole donacas al Marja Huleja mian barakon por ŝia tutviva uzo kaj loĝado. - Jes, bone, mia Marja, ĉion mi faros por vi", parolis la enamiĝinta Pantaleon, farante sian subskribon.

Sed jam la unuan tagon, kiam li prenis Marjan al si, ilia feliĉo malsereniĝis ĉar Pantaleon foriris en la gastejon por la kutima guto da brando. Kiam li malfrue revenis, Marja tre malkontentis. Post kelka tempo stratvendisto Mustanovic komencis vizitadi Marjan dum la foresto de Pantaleon. Okazis foje, ke Pantaleon, revenante hejmen el la gastejo, vane klopodis malfirmi sian barakon. Li enrigardis tra la fenestro kaj ekvidis sian Marjan kuŝantan kun Mustanovic. Pantaleon faris bruegon kaj kriis: "Malfermu mian barakon; alie mi vin ambaŭ mortigos. Kaj tiu kanajlo malfaperu!" - "Foriru maljunulaĉo," ekkriis Marja. "Tio estas mia barako. Ne ĝenu min; mi volas dormi." Kaj ili ne enlasis la kompatindan Pantaleon. Fine li devis foriri kaj dormi sur la herbaro.

Sed frumatene li levigis kaj iris al la vilaĝestro. Vi scias, ke en la vilaĝo, oni frumatene levigas, precipe somere, kaj la vilaĝestro estis jam laboranta, kaj vivinte en urbo, kio estas malofaĵo en ĉi tieaj vilaĝoj, hazarde ankaŭ mi ĉeestis pro la ofica afero. Pantaleon ekĝojis min vidante. "Ho, sinjoro ĝendarmestro, faru vian oficon", li kriis kaj rakontis al ni sian malfeliĉon, ke li estas elpelita el sia propre konstruita barako. Ni decidis, ke ni alvokos posttagmeze ambaŭ kulpulojn kaj klopodos aranĝi milde la aferon. Posttagmeze ni ĉiuj kunvenis. "Pro kio vi ne volis enlasi Pantaleon en lian barakon?" demandis la vilaĝestro. - "Ho, sinjoro ĝendarmestro," turnis sin Marja al mi, "jen la dokumento, ke la barako estas mia". Kaj en tio momento tio okazis. Marja estis prezentanta al mi la paperon. Fulmrapide streĉiĝis la mano de Pantaleon, eliris la paperon el la mano de Marja, metis ĝin en la buŝon kaj ĝin dismaĉis.

Tiamaniere savis Pantaleon la barakon!

Amo sur la kvina etaĝo

— Z. Segaloviĉ —

La kvina etaĝo havas dek popersonajn ĉambrojn. Kiam oni lumigas en la koridoro la elektran lampon, videbliĝas multaj pordoj unu apud la alia, simetriaj kvazaŭ en hotelo. Sur iuj pordoj pendas vizitkartoj. Sub tiuj ĉi vizitkartoj vivas homoj... La loĝantoj de la kvina etaĝo ne estas ankoraŭ maljunaj, sed ne estas ankaŭ junaj. Vere juna estas nur la servistino Svertŝa, kiu purigas la dek apartajn ĉambrojn. Svertŝa alportas lakton kaj preparas teon por ĉiuj loĝantoj. Ŝi laboras la tutan tagon, laboras kaj kantas observante ĉiujn etaĝanojn. Kaj ŝi scias ĉiujn iliajn sekretojn kaj disportas tiujn ĉi sekretojn de unu al la alia, klaŝas kaj sukcesas ĉiun tiri ĉe la nazo.

Ŝi tre ŝatas priridadi la homojn; ŝi, Svertŝa, kiu alvenis ĉi tien el malproksima vilaĝo, scipovas multajn kamparajn kantetojn kaj ŝi havas sian propran vidpunkton pri la vivo. Ŝi malamas la urbon, priridas ĉion kaj ĉiun, sed plej multe ŝin ridigas la dek ekzempleroj de la kvina etaĝo. Kvarmaljunaj fraŭloj kaj ses konserviĝintaj fraŭlinoj. El ĉi tiuj ses, ĉiu opinias sin la plej juna. Ĉiu aparte estas ankoraŭ ne maljuna por si mem. Sargita de jaroj estas nur la akuŝistino, kiu loĝas en la ĉambro numero sep. Kaj la akuŝistino volas kredi al si kaj kredi al la servistino, ke ŝi estas ankoraŭ tre juna... kiom longe estas de ŝia naskiĝo? Jen nur iom...

Sed tamen, fraŭlino Leonjo tute ne estas jam juna knabino. Fraŭlino Leonjo, malgraŭ, ke ŝi estas posedantino de tiel bele sonanta antaŭnomo, havas sur la vizaĝo ankaŭ tri verukojn: du sur la maldekstra vango kaj unu sub la nazo, sur la loko, kie ĉe viroj kreskas lipharoj. Sur tiu ĉi veruko troviĝas mallonga hareto, kiu estas nek nigra, nek bruna sed griza, vera signo, ke fraŭlino Leonjo transpasis jam kvardek printempojn. La akuŝistino scipovas multe rakonti pri la jaroj, kiujn la konserviĝintaj fraŭlinoj portas sur siaj ŝultroj... Pri siaj jaroj ŝi silentas. Sed ja ne silentas Svertŝa. Ŝi ŝcipovas rakonti, ke la akuŝistino kolorigas la harojn kaj se tiĝn ŝi ne farus, ŝi aspektus kiel avino.

El la viroj unu estas instruisto, larĝŝultra sinjoro kun grandaj akulvitroj. Oni diras pri li, ke li estas tre bona instruisto, sed li ĉiam perdas siajn lernantojn pro sia tusado. Li iel nerve tusas. Kio estas ĉe li tiel natura, kiel ĉe aliaj la spirado. Homo, silentulo, maljuna fraŭlo, kiu portas somere kaj vintre varman tolaĵon kaj ne trinkas teon sen lakto. La sola trezoro, kiun li posedas, estas granda pluvombrelo, de kiu li tre malofte disiĝas. La instruisto estas for de ĉiuj; oni povus opinii, ke tiu ĉi homo rezignis... Tamen Svertŝa scipovas rakonti, ke la instruisto, la tusulo... jes, dum la unua tempo venadis en la kuirejon mendi la teon kaj okaze restadis en la kuirejo iom pli longe kaj iel vagadis per la manoj ien en la mondון, ĝis kiam, foje, ankaŭ iel li ricevis de Svertŝa vangofrapon je kiu li respondis per tusado. Nun li tusadas jam ĉe si, en la ĉambro.

Svertŝa scipovas ankaŭ rakonti, ke ĉiun duan semajnon li venigas iun al si: "Sed tiajn malbelajn, tiajn sulkiĝintajn". Ofte ŝi sciigas la ceterajn najbarojn: la instruisto havas hodiaŭ feston. Malfermiĝas la pordoj; oni elŝteligas; oni flustras.

Unu volus kiel eble plej multe priridi la alian. Sur la kvina etaĝo oni ne havas multe da ĝojo kaj plezuro, kaj se unu homo ne donas al la alia iom da homeco, iom da amikeco, do certe li povas ĉiam fordoni iom da galo, klaĉo kaj malestimo. Svertŝa scipovas rakonti, ke fraŭlino Leonjo havas amanton; La akuŝistino ekflamiĝas, ŝiaj okuloj ekbolas, kiel ĉe kato persekutanta muson: "Svertŝa, vi mensogas..." — "Verol! Kiel Dion mi amas!" — "Kia li estas? Maljunulo?" — "Ne, juna, tute juna." La akuŝistino paliĝas; ŝi volus ridi, priridi; sed ŝiaj lipoj ne ripozas, kvazaŭ ili trinkus maldolĉan trinkaĵon... "Eble vi eĉ diros, ke li estas ankaŭ bela, Svertŝa?" — "Li estas bela, sed..." — "Sed?" — "Li vidas nur per unu okulo." Nun la akuŝistino ekvivis. Se ŝi ne estus tiel multpeza kaj dika, ŝi certe ekdancus pro ĝojo. Tio, ke iu nekonata juna homo havas nur unu okulon, estas ja granda feliĉo, granda ĝojo. "Svertŝa! Vi aŭdas... se la amanto de Leonjo estus tute blinda, estus ja eĉ pli bone por li. Ja li ne

povus vidi Leonjon kun ŝiaj tri verukoj. La akuŝistino ridas kaj la servistino ridas. Inter-amigu fraŭlino Leonjo kun sia unuokulo...

Se la loĝantoj de la kvina etaĝo estus iom pli bonanimaj kaj iom pli toleremaj, oni povus fari inter ili kelkajn geedziĝojn. Sed la maljunaj fraŭlinoj neniel volas koni la maljunajn fraŭlojn kaj la maljunaj fraŭloj ne volas koni la konserviĝintajn knabinojn. Ambaŭ partioj malamas la maljunecon kaj evitas unu la alian... Ĉiu "ekzemplero" vivas en sia ĉambro kaj malamike rilatas al la kvina etaĝo. Oni ŝlosas la pordojn kaj festas por si. Sed, se unu volas scii pri la alia, oni venas al Svertŝa kaj ŝi scias ĉion ĝis la lastaj detalaĵoj.

Svertŝa scias, ke ankaŭ la akuŝistino havas "unu" kaj ŝi sukcesis. Ŝia "unu" vere estas juna. Ankoraŭ juna homo. La akuŝistino estas jarriĉa, sed anstataŭe ŝi havas bonan praktikon kaj en la banko estas ŝparita tute ne maldela sumeto...

Pri tio oni scias. Svertŝa scipovas rakonti pri la juna homo, kiu enŝtelaĵ sin dum la vesperaj horoj en la ĉambron numero sep, tien, kie sur la pordo pendas vizitkarto: Roza KINDERMAN, diplomita akuŝistino; ankaŭ masaĝo. Tuj kiam la pordo ĉe la akuŝistino estis ŝlosita de interne, kuris Svertŝa rekte al fraŭlino Leonjo en la ĉambron numero tri. "Fraŭlino Leonjo! Li jam estas ĉi tie." - "Kaj ŝi jam enŝlosis sin?" - "Jes..." - "Fia maljunknabino", diras Leonjo. "Kaj mi volas diri al la fraŭlino, ke ĉiuj maljunaj knabinoj estas fiaj". Tiel respondas Svertŝa kaj ŝi ridetas iel memfide, ke oni nenion povas al ŝi fari por la moko.

Fraŭlino Leonjo englutas la maldolĉan pilolon kaj kunpremas la dentojn: "Kion ŝi pensas? Edziniĝi kun li?" - "Povas esti...li tamen estas juna, sed granda maldiligentulo kaj neniofarulo, malriĉulo. Li ĉiam venas malsata kaj antaŭ ol li foriras, fraŭlino Roza donas al li kelkajn malgrandajn monerojn..." - "Ŝi volas aĉeti por si la edzon..." - "Ŝi ne estas la sola", ruze respondas la vilaĝana Svertŝa.

Lastatempe la koridoro de la kvina etaĝo estas plene okupita de la akuŝistino. Ŝi plenbloviĝis kaj graviĝis. Si... ŝi havas la junhomon kaj tiu ĉi junhomo alvenas ĉiujn

kelkajn tagojn. Li portas novan kostumon, novajn botojn... kaj Svertŝa scias rakonti, ke tio estas per la mono de fraŭlino Roza. En la koridoro oni flustras kaj poŝtigradas...

Kiam la kuirejo estas malfermita, kiam oni ekvidas Svertŝan, oni haltas kaj atendas, ke ŝi ion rakontu: "Kion novan oni aŭdas? Svertŝa?" - "Nenian... ree sensaliĝas haringoj en akvo." Jes, vere! En la kuirejo ĉe Svertŝa ofte sensaliĝas haringoj. Fremdulo certe ne scius, kion tio signifas. Sed la loĝantoj de la kvina etaĝo konas tiun ĉi signon: la akuŝistino havas junan amanton kaj la amanto estas ĉiam malsata, kaj la amanto ŝatas haringojn, la sensaliĝintajn haringojn... Scias ĉiuj en la koridoro, ke, se en la kuirejo de Svertŝa sensaliĝas haringoj, tio estas signo, ke hodiaŭ li venos, la amanto de fraŭlino Roza; jam prepariĝas por li la festeno... Kaj ridetas unu al la alia: "Sensaliĝas jam la haringoj!"

Ŝi estas ja maljuna, dika kaj multepeza, sed la juna homo estas malsata kaj li estas denaska parazito. Por la sensaliĝintaj haringoj li fordonas sian junecon, sian liberecon. Fraŭlino Leonjo envias - ŝia amanto havas nur unu okulon. Se ŝi havus tiom multe da mono, kiel la dika akuŝistino ŝi certe trovus iun kun du okuloj.

En la koridoro oni flustras kaj Svertŝa kuras de unu al la alia: "Ili interkisiĝas". Ŝi mem vidis, kiel ili interkisiĝadis. Unu la alian envias, unu al la alia volus fari ion malbonan. Oni observas. Oni esploras kaj subaŭskultas. Sed okazas foje vespero, kiam la maljuna instruisto, la tusulo, venigas al si en la ĉambron, sian amon; al fraŭlino Leonjo venas la unuokulo, sin enŝtelas al la akuŝistino la haringmanĝulo kaj ankaŭ la ceteraj pordoj estas fermitaj. Ĉiu el la loĝantoj havigis iun al si...


Kaj tiam silente kaj trankvile estas sur la kvina etaĝo. Svertŝa sidas sola en la kuirejo. Ŝi restas senlabora. Neniu nun bezonas ŝiajn klaĉojn... Ŝi dismetas la manojn, atendas kaj sopiras...

Tradukis: J. Dratwer

SOLVO DE LA ANTAAU PROBLEMO

KRUC-VORT-ENIGMO

POR VIA DISTRO



NOMBRA ENIGMO

Ĉiu nombro signifas unu literon. La solvo konsistas el 65 literoj. La ŝlosil-vortoj estas

- 26 6 14 10 27 22 34 15 : orientazia lando
 - 20 17 31 32 47 59 49 19 29 39 : fervoja bilet-kontrolisto
 - 8 20 13 35 32 4 41 25 36 21 55 :: norda landaro
 - 61 38 37 43 51 52 53 54 15 : jarparto
 - 1 29 17 53 30 46 19 : laktaĵo
 - 28 24 63 33 58 9 39 : grandegulo
 - 16 2 3 9 53 45 27 49 7 18 55 : objekto de sinjorinaj revoj
 - 5 50 14 42 12 15 : kapkovrilo
 - 11 60 44 64 40 38 17 : oficista enspezo
 - 23 62 28 4 48 53 22 31 32 19 : vira nomo
 - 57 59 56 16 29 2 65 39 : rapidega vagonaro.
- 1-65 : malnova ĉina proverbo, tre stranga sed eble prava.

LA VIVO EN GRESILLON

ANEKDOTO

Brueme anonciĝas la vagonaro (jes, tiam ĉekzistis tiu pitoreska relaŭto, kiu veturigis vojaĝantojn de Le Mans al Saumur, kaj reen, tra Baumé; Antaŭ ol laŭiri la bienon Grésillon, la kondukisto de la maŝino informis pri sia alveno per fajfado. Tut! Tut! Jen mi. Kelkaj gesamideanoj staras rande de la parko, tutproksime de la relvojo, pretaj salutsvingi siajn manojn al la forirantaj geamikoj. Dum unu, du, eĉ pli da semajnoj ili kune vivis sub la sama tegmento, sidis kune en la manĝoĉambro, ĉeestis kune la kursojn, trapromenis kune la arbaron, vizitis kune la ĉirkaŭaĵon. Tiam, dek jarojn post la fondiĝo de la Esperanto-Kulturdomo, oni ankoraŭ plej ofte uzis la komunajn vetur-rimedojn, vagonarojn aŭ aŭbusojn, por la longaj vizitiroj ol nun; oni ne hezitis utiligi siajn piedojn por promenadoj al la proksimaj vidindaĵoj. Ŝajnas, ke la kilometroj estis malpli longaj aŭ ke, tutsimple, la vortoj "urĝeco" kaj "rapideco" ne havis la saman signifon ol nun. Ne gravas! Oni preferas eluzi la pneŭmatikojn ol la plandumojn En "solidareca mondo" oni pli kaj pli apartiĝas. Sed... ni ne plu filozofu!

Tiun tagon, en la vagonaro sidis, inter aliaj restadintoj, iu grava viro preskaŭ sepdekjara, kies kompetenteco en Esperanto levis lin ĝis la posteno de prezidanto de la Esperanto-grupo de sia granda urbo. Multscia li estis, kaj lia konversacio estis ĉiam riĉa kaj interesa. Li alvenis antaŭ du semajnoj kaj kompreneble fariĝis unu el la kulturaj animantoj de la studperiodo.

Kiam li aliĝis eĉ ne iu unulita ĉambro libera por la eminentulo! Sed por plezurigi lin lito estis pretigita en iu dultita ĉambro. Tiam, nur de mallonga tempo, la aliĝintoj ne estis devigataj alporti siajn proprajn littukojn, kiel okazis komence de la vivo de la Esperanto-Domo. Ne plu! Sed kompreneble la nombro da tukoj posedataj de la Domo ne estis tre granda kaj oni pretigis per ili nur la litojn okupotajn. Do s-ro... (ni diru s-ro M...) estis akceptita ĉe la stacidomo. Afable, kiel kutime, kaj lia peza valizo estis metita en la kofron de aŭtomobilo atendanta la alvenantojn. Du Nederlandanoj alvenis samtempe kun s-ro M. Post kvinminuta veturado aĝrabligata de prezentvortoj reciprokaj, jen Grésillon! "S-ro M. vi okupos la ĉambron 24-an". Iu montris al li la vojon al la 2-a etaĝo. Tuj kiam li malfermis la pordon li rigardas al la fenestro kaj, tra ĝi, malkovras la parkon kaj la lageton. Belege! S-ro M. metas sian valizon sur unu el la litoj kaj iras al la fenestro, kiun li malfermas. La akompananto diris al li, ke la vespermanĝo okazos post duonhoro. S-ro M. elprenas kelkajn necesajojn el la valizo kaj metas ilin en la ŝranketon aŭ sur la breton de la lavokonko. Ĉar la valizo ne ĝenos li lasas ĝin sur la lito. Nova longa rigardo al la lageto kaj li aŭdas la sonorilvokon. Ek al la manĝoĉambro s-ro M., kie vi renkontos viajn pordusemajnajn kunvivantojn.

Sed, ĉimatenne s-ro M. malsupreniris la ŝtuparon kun sia valizo ĉemane.lom malĝoja, ke du semajnoj daŭras nur dekkvar tagojn! Li tiras la respondeculon aparten: "Sinjoro, kial vi ne informas, ke oni devas alporti siajn littukojn?" - "Sed, s-ro M. ne necesas nun, de jam kelkaj jaroj." - "Mia lito estis sentuka." - "Kial vi ne sciigis tion al ni? Verŝajne estas eraro de la deĵorantino. Bonvolu senkulpiĝi nin." - "Ne gravas. Mi ne volis ĝeni. Mi faru rimarkon malagrablan al la deĵorantino. Espereble, ĝis revido. Mi spertis tre agrablan restadon. Dankon!". Kaj ek al la stacidomo!

Tre konfuzita, la respondeculo rapide iras al la ĉambro 24-a. Li konstatas, ke la lito pretigita ne estis okupita. Ĝi ankoraŭ montris la spuron de valizo, kiu okupis ĝin dum la du semajnoj!

P.B.

NIAJ PERKORESPONDAJ KURSOJ

POR LA KOMENCANTOJ: Kurso per mem-korekta metodo. Tiu metodo ebligas progresadon adaptitan al la ritmo elektita de la lernanto, kiu, paŝon post paŝo, korektas mem siajn erarojn. Testo-folioj sendotaj al la korektanto ebligas kontrolon. La korektanto tiam atentigas la lernanton pri la lingvaj punktoj ankoraŭ ne bone asimilitaj.

La prezo de tiu kurso estas: 200 fr. fr.

POR LA PRAKTIKANTOJ: por akiri la praktikadon de la lingvo. Ilustrita kurso, tekstoj, gramatikaj rimarkoj, taskoj sendotaj al korektanto.

La prezo de tiu kurso estas: 200 fr.fr.

SUPERA KURSO: De- kaj al-tradukoj, atentigoj pri gravaj gramatikaj punktoj, ĉefaj eroj de la historio de Esperanto. Bona preparado al la Atesto pri Kapableco.

Prezo de la kurso: 150 fr.fr.

NIA LIBRO-SERVO

POR LA PRAKTIKANTOJ: (P. Babin) - Taŭga por paroligi progresantojn.
5-a eldono - 35 fr.fr.

GRAMATIKA GVIDLIBRO: modernigita prezento - 50 fr.fr.

PREPARADO AL LA ATESTO PRI KAPABLECO: (A. Ribot) - 3-a eldono reviziita -
Prezo: 30 fr.fr.

NOVE AKIRITAJ POR LA PLI JUNAJ KAJ LA KOMENCANTOJ. BELAJ ILUSTRAĴOJ.

a) Serio da novaj ĉinaj rakontoj:

Lerni pentradon (12 ff.) - Levi ŝuon (12 ff.)
Rakonto pri Sima Guang (15 ff.) - Serĉi instruanton (17 ff.)

b) Aliaj rakontoj:

La novaj vestoj de la imperiestro (53 ff.)
La dorsosako de Panjo Rut' (Bako-Piron 80 ff.)

Por progresantoj:

Memorlibro omaĝe al Andreo Cseh (80 ff.)
La kruĉo da saĝeco (Eroŝenko 45 ff.)

Mendu de S-ino Vincent, 26bis, rue de Milngavie, F-49150 BAUGE, sed NE sendu monon. Atendu la fakturon! Dankon.



GRAMATIKO PER BONHUMORO

TEMPO-DAŬRO — DATO

DUM - EN estas prepozicioj, kiuj esprimas :

- la daŭron de ago
- dum la promonado ili sekrete parolis
- en tri tagoj, ili farbis la ĉambron
- la daton
- li naskiĝis en la 3-a de majo.

N povas anstataŭigi tiujn prepoziciojn :

- la konstruo de tiu ponto daŭris tri jarojn
- la tutan julion okazis muzikaj renkontoj
- li mortis la 23-an de januaro.

RIM : oni metas :

- aŭ prepozicion
 - aŭ **N**
- sed **NE** ambaŭ samtempe.

Ja, kaptilo por la alaŭdoj !



Kiel flatemaj estas tiuj stultulinoj ! Kiom da tempo funkcias tiu sensaciaĵo ? Du tagojn ? Ni restu fidelaj je la veturiloj de nia patro.

Liaj, ŝiaj, iliaj esperoj kaj bedaŭroj.



Kiel agrable ni amindumis dum la tuta vespero. Bedaŭrinde nur merkredon, t.e. morgaŭ, mi ricevas mian vivigan injekton.

Ĉu jes aŭ ne ?



Atentu la naztuketon ! Post unu sekundo ĝi falos... ŝi eliros... atentos unu minuton... revenos. Mi volonte restus kun ŝi unu horon.

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse, 2, LINZ (250 aŭstr. ŝil.).
- Belgio** : Eldonejo Librejo Sonorilo vzw Doornstraat 22, B-2610 Wilrijk - Pĉk : 000.0152140-44 (560 B.F.).
- Britujo** : John C. Rapley, 17 The Grange, Shepherdswell, Dover, Kent CT 15 7 Q B. (10 pundoj).
- Danlando** : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (90 kronoj).
- Finnlando** : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (70 mk.).
- Germanujo** : Annelis Rudolf, DACHSBERGSTRASSE, 1 W 3507 BAUNATAL pĉk. Frankfurt (M. 2759 35-609) (25 D.M.).
- Hispanio** : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 10-10*-D 03003 ALICANTE - (1 700 peset.).
- Italio** : Itala Interlingvistika Centro, via Pantano 17, 20122 Milano - pĉk : 42 37 12 03 Literatura Foira (20.000 liroj).
- Japanio** : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaši-Nakano, Hatiōziši TOKYO-TO, J-192.03 (2700 jenoj - aerpoŝte : 3250 jenoj).
- Nederlando** : Gerard van der Horst, Hengelolaan 1158, 2544 GT DEN HAAG poŝtkonto : 39743. (28 fl.).
- Nov-Zelando** : Sino Gwenda Sutton, 12 c Herbert Gardens, 186 The Terrace, Wellington 1 (aerpoŝte : 18 n.z.dol.).
- Pollando** : Pola Esperanto-Asocio, ul. Krucza 38/42 00512 VARSOVIO (15 us. dol.).
- Portugalio** : Portugala Esperanto-Asocio, rua Dr. João Couto, 6, R/C-A - 1500 Lisboa (2.800 esk.).
- Svedujo** : Sveda Esperanto-Asocio, Sōdra Rōrum, pl. 455, S-242 94 Hōrby - p.k. : 2012-3 (80 kr.).
- Svislando** : Esperanto Perkorespondante, Claude Gacond, strato Chevreuils 14, CH-2300, La Chaux-de-Fonds, PK.23-4669-1 (220 s.f.).
- Usono** : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (15 us. dol. - aerpoŝte : 20 us. dol.).
- Aliaj landoj** : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 15 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj. Aerpoŝte : 20 us. dol.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De julio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncintajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfera frateca ;
- Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempe ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

venu al la esperantista kulturdomo

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkuponon al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, F-49150 BAUGÉ. — Tél. 41-89-10-34